

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 6/2005



La julavinjo estas Varpu Karo, helpanto Anna Ritamäki. – Artikoleto pri julfesto de EST sur p. 20.

Rakonto de Annansilmä-simbolo, p. 4

Haastattelussa Pekka Kivioja, s. 8

Vintraĵ Tagoj, p. 13 ♦ Esperantoa ilman hattuĵa? s. 27

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@surfeu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 18 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Anna Ritamäki*

Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ✉ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

tuomo.grundstrom

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ @lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@netsonic.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timo.pirinen@gmail.com

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Temaj tagoj – instigo al informado

Kiam vi legas tion ĉi ĵus pasis la 15a de decembro, la Zamenhoftago, ankaŭ konata kiel la tago de la Esperantolibro aŭ simple la Esperantotago. La naskiĝdatreveno de Zamenhof estas festotago de nia lingvo komparebla al la flagotagoj en nia kalendaro. La tradicio estas forta. La tago estas konata kaj vaste festata inter esperantistoj. Tio videblas ankaŭ en formo de festoj en niaj kluboj. En Turkio ĝi ekzemple inspiris okazigon de literatura kvizo.

La lasta plena semajno de februaro estas festata en la Esperantomovado kiel la Semajno de Internacia Amikeco (SIA). Edvige Ackermann, komisiito de UEA pri SIA informas ke svedo Erik Carlén anoncis la ideon pri la starigo de ĉiujara Semajno de Internacia Amikeco, kiu fariĝis tutmonda tradicio. La tiama vicprezidanto de UEA formulis sian ideon per la devizo: Interkompreniĝo + Amikiĝo = Esperanto:

“Ni ekbruligu la flamon de Amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj”.

Samsemajne festas ankaŭ aliaj. La 21an de februaro Unesko deklaris tago de la patrina lingvo. La sama tago estas la internacia tago de la ĉiĉeronoj. La 22a de februaro, la naskiĝtago de la fondinto de skoltismo Baden-Powell, estas festata kiel la Interpenza tago.

Alia festebla tago estas la 26a de julio, la naskiĝtago de Esperanto. En tiu tago (14a de julio laŭ la malnova rusa kalendaro) en 1887 la cenzuro en Varsovio subskribis la duan permeson pri la unua libro. Tiam la libro jam estis presita kaj oni rajtis disvastigi ĝin. “La periodo de la jaro estas aparte favora por lanĉi gazetarajn komunikojn – ja multaj homoj kaj institucioj ferias kaj la ĵurnalistoj kutimas dankeme akcepti tekstojn. Kutime eblas atentigi pri la UK similperiodo”, skribis Marko Naoki Lins en retmesaĝo aprile, kiam li ankoraŭ okupiĝis pri informado por Eŭropa Esperanto-Unio kaj UEA. Li konsilas montri rilaton inter laboro kaj efiko, ekzemple okazigon de publika prelego; pri tio la gazetoj kutime pretas informi jam antaŭe laŭ la stilo “Esperanto festas sian naskiĝtagon”.

La 26an de septembro estas Eŭropa lingvotago, deklarita de Konsilio de Eŭropo kaj Eŭropa Unio. Krome la unua sabato de oktobro estis lanĉita kiel Ago-Tago en kiu esperantistoj laŭ la lokaj eblecoj faru informajn agadojn pri Esperanto.

La estraro de EAF kelkfoje diskutis kiel eluzi la eblecojn kiujn ofertas la temaj tagoj. Ni konstatis ke plej gravas bona planado, sufiĉe frua atento. Klaran informan planon ni ankoraŭ ne havas, sed ni estas sur la ĝusta vojo. Per tiuj ĉi pensoj mi volas instigi vin ĉiujn pripensi ĉu aŭ kiel vi volas kaj povas atenti temajn tagojn.

Anna Ritamäki

Flora simbolo de la finna blindul-organizo

Post esperantokongresoj en Vilno la gaja japana delegacio konatiĝis kun la servoj de la blindulcentro Iris en Helsinki. En Iris troviĝas i.a. vendejo, kiu vendas produktojn faritaj de blinduloj. Tiuj varoj portas markon de ruĝflava floro. Japanaj gastoj rimarkis tiun simbolon kaj aŭdis la nomon de floro. En la finna ĝi nomiĝas "annansilmä" (Begonia x cheimantha J.G.C. Web). Floristoj konas ankaŭ nomon kristnaska begonia. Ĉi tiu simbolo estas ankaŭ signo de la finna blindul-organizo.

La finna nomo annansilmä efektive havas du signifojn: "okulo de Anna" kaj "mi donas/donacas okulon/vidkapablon". Anna estas averaĝe la plej populara malnova virina nomo en Finnlando kaj ankaŭ en multaj aliaj landoj. Kiel nomo de sanktulo ĝia origino estas la hebrea nomo Hannah "graco, korfavoro". Krome ekzistas multegaj variantoj, ekz. Anne, Anneli, Annika, angle Ann, Nanny, Nancy, hispane Anita, slavdevena Anja ktp.

Kial ĝi fariĝis simbolo de blindul-organizo?

Post hejmvoyaĝo el Japanio venis peto de pliaj sciigoj pri la flora simbolo. Helpe de Arvo Karvinen mi ricevis artikolon pri la kreinto de flora simbolo publikigita en 1996. Ĉar mi pensas, ke ankaŭ legantoj de Esperanta Finnlando eble interesiĝas pri la fonto kaj signifo de flora simbolo, jen la traduko de intervjuo.

"Annansilmä-simbolo fariĝis simbolo de vidhandikapajo. Ĝi aperas en la signo de la finna federacio de vidhandikapitoj. En produktoj faritaj de vidhandikapitoj la simbolo garantias, ke la produkto efektive estas manlaboro de blindulo. Annansilmä-simbolon faris en la jaro 1976 s-ro Terho Ovaska, poste konata kiel karikaturredegnisto de la gazeto Helsingin Sanomat (la

plej granda gazeto en Finnlando kaj en Eŭropo). Kial li faris ĝin?

– Ekde infaneco mi desegnis ĉion eblan, li rakontas. Laŭnature mi faris la afiŝojn de teatraĵoj de mia hejmvilaĝo kaj planis la ringon por la klaso. Tamen mi sciis, ke oni ne vivtenas sin pere de desegnado kaj post la lernejo mi trapasis ekzamenon en vendista instituto. Post la ekzameno mi laboris kiel ĉefo de reklamado en du firmaoj, kaj en oficejo de reklamado. En la oficejo de reklamado mi renkontis s-ron Arvo Karvinen, la ĝeneralan sekretarion de la federacio de blinduloj (nuntempa federacio de vidhandikapitoj).

Humana tasko al reklamisto

La federacio de blinduloj planis grandan kampanjon por kolekti monon al nova rekapabligna sekcio. Por ricevi profesian helpon en la planado de kampanjo ili turnis sin al la reklama oficejo.

En la federacio oni pensis, ke la kerno de kampanjo estu vendado de butono. Terho Ovaska ricevis modelon.

– Ĝi estis unu malgranda flava butono kun nigraj brajlaj signoj. Tio fakte estis punktskribo, sed kion ĝi signifis, mi ne scias.

– Mi rigardis butonon. Laŭ mia opinio ĝi estis tro forta signo kaj ne ege alloga. Do, tamen oni intencis vendi centojn da miloj de ili, pripensis Ovaska.

Oni donis al Terho Ovaska liberajn manojn por plani la kampanjon. Li rakontas, ke li travivis multajn sentojn.

– Mi malmulte konis la mondon de vidhandikapitoj kaj sentis ioman timemon. Mi mem havas unu kronikan malsanon, kiu bone restas en brido pere de medikamentoj, kaj mi pripensis kiaspecan butonon mi mem volus havi por rakonti pri mia malsano.



Memfiguro de la karikaturisto Terho Ovaska kun la Annansilmä-simbolo, kiun li desegnigis en 1976.

– La tasko estis delikata kaj tial ankaŭ ege defia kaj inspira, Ovaska diras. – Tio estas tute alia ol planado de reklamo de ŝampuo.

El bildlibro de floroj al simbolo de kampanjo

Ovaska pripensis pri vendebleco de butono. La butonon kun brajlajo li forlasis. La butono devus esti bela, prefere ornamaĵo.

– Mi multege pripensis kaj finfine venis ideo: ĝi devus esti unu floro kaj tial mi iris al biblioteko kaj foliumis bildlibrojn pri floroj.

Kiam aperis la bildo de annansilmä, travivaĵo kaptis lin: la nomo kaj la formo estas taŭgaj.

– Samtempe al la kapo venis la ideo de la tuta kampanjo: ”Kiam mi aĉetas butonon, mi donacas okulojn/vidkapablon”, Ovaska memoras.

Okuloj al blindulo?

En la federacio de blinduloj oni kontraŭstaris la ideon de annansilmä: ĉu ne estas kuraĝa paroli pri donaco de okuloj, ĉar la kolektanto estas blindul-organizo?

Al la ĝenerala sekretario Arvo Karvinen, mem blinda, la ideo tamen plaĉis kaj li forte subtenis

ĝin. Finfine Ovaska ricevis rajton konstrui kampanjon sur la bazo de Annansilmä-simbolo. Krom la butono li planis ankaŭ la tutan alian kampanjomaterialon.

– La butono fariĝis pli granda ol la brajla butono. Sur nigra fundo estis ruĝa floro (floro annansilmä) kun flavaj stamenoj. La koloroj alvenis rekte el la naturo.

La kampanjo komenciĝis la aprilan trompan tagon (1.4.) en la jaro 1976. Lernantoj vendis tiel multe da butonoj, ke oni kolektis 6 tiamajn milionojn finnajn markojn (538 000 eŭroj). La mono estis bona komenco por la rekapabla sekcio de la blindul-organizo.

– El la Annansilmä-butono ŝajnis stariĝi vera butonmanio, ridetas Terho Ovaska. La butono estis produktata en Britio, sed post la kampanjo oni komencis produkti butonojn ankaŭ en Finnlando kaj surstrate ili fariĝis pli videblaj.

Karikaturdesegnisto devas ĉiutage renovigi sin


La kunlaboro de Terho Ovaska kun la federacio de blinduloj daŭris ankoraŭ longe pli poste kiam li fariĝis ‘freelancer’ por realigi revon de desegni karikaturojn plentempe.

– Post kelka tempo de libera laboristo oni dungis min ĉe gazeto Uusi Suomi kaj Iltalehti por desegni. En aŭtuno 1991, nur du monatoj antaŭ ol gazeto Uusi Suomi finis, oni petis min kiel posteulon de Kari Suomalainen (fama karikatur-desegnisto) ĉe Helsingin Sanomat.

Terho Ovaska rakontas, ke la laboro de karikaturisto estas peniga. Ĉiutage oni devus krei novan ideon kaj ankaŭ vesti ĝin kiel trafan desegnaĵon. Estas temporaba sekvi diversajn publikajn informfontojn por daŭre esti sur la nervaro de tempo kaj kompreni aktualajn aferojn.

– Do, ĝi nomiĝas nur Terho, ridetas Ovaska pri la malgranda filozofo-aspekta figuro, kiu de tempo al tempo komentas aferojn en liaj desegnaĵoj kaj en la aldona desegnaĵo en la artikolo portas annansilmä-floron en la mano.

– Li estas mia *alter ego*, tiu kaŝe staranta, pli ▷



Kansainväliset Nobel-palkinnot kansainvälisen kielen käyttäjille

Nobel-palkintojen tämänvuotiset saajat on äskettäin julkistettu. Lääketieteen palkinnon saavat kaksi australialaista vatsatautien tutkijaa. Fysiikasta palkitaan kaksi yhdysvaltalaisista ja yksi saksalainen optisen tekniikan alan keksinnöistä. Kemian palkinto jakautuu kahden yhdysvaltalaisen ja yhden ranskalaisen kesken.

Rauhanpalkinto annetaan kansainväliselle atomienergiajärjestölle ja sen egyptiläiselle johtajalle ja kirjallisuuspalkinto brittiläiselle näytelmäkirjailijalle. Taloustieteen palkinto (joka muuten ei ole varsinaisesti Nobel-palkinto, sillä sitä ei ole perustettu Alfred Nobelin testamentista, vaan se on Ruotsin valtionpankin palkinto, joka vain on nimetty Nobelin mukaan) jaetaan yhdysvaltalaisen ja israelilais-yhdysvaltalaisen kesken.

Viime vuosikymmeninä Nobelin palkinnoissa on saatu tottua siihen, että suurin osa palkinnon saajista on Yhdysvalloista. Tämän vuoden palkinnot jakautuvat suorastaan poikkeuksellisen tasapuolisesti eri maihin, kun ”vain” puolet palkituista on yhdysvaltalaisia.

Kirjallisuuden ja rauhan palkintoja on jaettu melko tasapuolisesti eri maitten ja kielialueitten edustajille. Tosin kirjallisuuspalkinto vuodesta 1980 lähtien on jo kahdeksan kertaa mennyt englanninkieliseen maahan. Samaan aikaan muista suurimmista kielialueista kiinalainen on saanut kirjallisuus-Nobelin kerran, espanjankielisen maan asukas kaksi kertaa ja arabi kerran. Taloustieteen palkinto näyttää menevän melkein joka vuosi amerikkalaiselle.

Myös fysiikan, kemian ja lääketieteen palkinnot ovat viime vuosikymmeninä painottuneet

voimakkaasti Yhdysvaltoihin. Vuodesta 1980 lähtien on palkittu yhteensä 174 tutkijaa, joista 104 on ollut yhdysvaltalaisia. Muitakin maita vertailtaessa englanninkieliset maat näyttävät olevan vahvoilla: toiseksi eniten tie-de-Nobeleita vuodesta 1980 lähtien on tosin saanut Saksa 14 kappaletta, mutta heti perässään Iso-Britannia 13, kun taas Japaniin on irronnut vain 6, Ranskaan 6, Venäjälle 3 ja Italiaan 2 kertaa. Myös Kanadan saamat 5 ja Australian 3 Nobelia ovat suurenpuoleisia määriä, jos niitä suhteuttaa muitten teollisuusmaitten joukossa väkilukuihin ja Nobel-palkintojen määrään.

Kuitenkin on mahdotonta olettaa, että Japanissa ei tehtäisi runsaasti korkeatasoista tiedettä. Japani on jo vuosikymmeniä ollut kaikenlaisessa teknologiassa maailman edistyneimpiä maita ja on esimerkiksi lähettänyt paljon avaruusluotaimia ja satelliitteja. Ihmisten keskimääräinen elinikä on Japanissa jo kauan ollut yksi maailman korkeimmista, joten tuskin lääketieteekään siellä on heikolla tasolla. Kiinakin, joka Nobelin palkintojen vuodesta 1901 alkavan historian aikana ei ole saanut yhtään fysiikan, kemian tai lääketieteen palkintoa, lähettää jo ihmisiä avaruuteen.

Nobel-palkintojen saajat päätetään Ruotsissa ja Norjassa, joten palkintojen painottumisessa englanninkielisiin maihin ei ole kysymys oman maan suosimisesta. Kysymys on tieteellisten julkaisujen kielikäytännöistä. Nykyään suomalaistenkin luonnontieteilijöitten väitöskirjat julkaistaan pelkästään englanninkielisinä ja kansainvälisten konferenssien kielenä on lähes aina englanti. Yliopiston opiskelija joutuu opiskelunsa kuluessa lukemaan paljon asioita englanninkielisestä materiaalista.

Nykymaailmassa luonnontieteilijä joutuu siis väistämättä tottumaan siihen, että englantia täytyy ainakin osata lukea sujuvasti ja pystyä ymmärrettävästi kirjoittamaan. Siitä ei kuitenkaan seuraa, että eri kielialueitten luonnontieteilijät olisivat samoissa lähtökohdissa. Englanninkielisiltä alueilta on aivan ilmeisesti helpompaa päästä huipulle, mikä näkyy Nobel-palkintojen määrissä.

On tietysti järkevää, että tieteessä on käytössä yksi yhteinen kieli, jos pidetään ihanteena sitä, että tiede on avointa ja sen tuloksia on tarkoitus käyttää ihmiskunnan yhteiseksi hyväksi. Tiedemaailmalla on vielä varaa kehittyä entistä enemmänkin yhteisen kielen käytön suuntaan, sillä kaikkialla ei olla vielä yhtä pitkällä englanninkielisessä linjassa kuin meillä Pohjois-Euroopassa. Esimerkiksi ranskalaisella kielialueella on edelleen professoreja, jotka eivät puhu ainakaan kunnollista englantia.

Luontevaa on, että tieteen maailmankielen asemaan on päätenyt englantia, sillä sehän on kuitenkin teollisuusmaitten suurin kielialue. Maailman 400 miljoonaa englanninpuhujaa asuvat lähes kaikki teollisuusmaissa, kun taas muut satojen miljoonien puhujien kielet, kiina, espanja, arabia, hindi ja bengali, ovat pääosin kehitysmaissa. Englannin aseman teollisuusmaitten puhutuimpana kielenä voisi lähitulevai-

suudessa lopettaa Kiinan nousu kohti teollisuusmaitten joukkoa. Mutta vaikka kiinasta tulisi teollisuusmaissa eniten puhuttu kieli, se tuskin ainakaan pian syrjäyttäisi englantia tieteellisten julkaisujen yleiskielenä.

Maailman luonnontieteilijöistä kuitenkin selvä enemmistö on muun kielialueen kuin englannin jäseniä. Voi kysyä, onko muunkielisillä tieteilijöillä lopulta intressiä opetella käyttämään täydellistä englantia tieteellisiä julkaisuja varten, vai kehittykö englannista jonkinlainen tiedeslangi, joka käy eri maalaisten tieteilijöitten väliseen kommunikointiin, mutta ei noudatakaan arkikielenä puhutun englannin kaikkia kielioppisääntöjä. Siten varmasti säästyisi maailmassa yhteensä kielenopiskeluun tarvittavaa panostusta, sillä englanninkielisiltä olisi luultavasti pieni vaiva opetella käyttämään omaa kieltään hieman yksinkertaisempaan muotoon muunnettuna verrattuna siihen, kuinka paljon vaivaa muut säästäisivät, kun eivät joutuisi opettelemaan kaikkia englannin kielen hienouksia.

Niin voi hyvinkin tapahtua, olettaen, että maailman tiedeyhteisö ei tee todella järkevää ratkaisua ja rupea käyttämään sellaista kieltä, joka on alusta lähtien johdonmukaisesti kehitetty kansainväliseksi apukieleksi.

Mikko Mäkitalo

▷ meditantaj kaj trankvila egoo. Komprenoble mi ricevis modelon al tiu figuro de Kari Suomalainen, kies eta kolera nigrevestita viro ridigis homojn dum jardekoj pere de siaj pikeme ironiaj komentoj.

Ovaska opinias, ke Kari Suomalainen estas nepreterinda antaŭulo kaj karikaturisto, samegalaj eble ne plu estos en Finnlando.

Ankoraŭ fieraj

La nova direktoro de la federacio de blinduloj s-ro Pentti Lappalainen, kiu estis dungita por

komenci laboron ĝuste en la komenca tago de kampanjo, ege raviĝis pri la Annansilmä-simbolo. Laŭ lia influo ĝi fariĝis la simbolo de organizo, kiam la nomo de asocio estis ŝanĝita al federacio de vidhandikapitoj en la jaro 1980.

– Kiam mi vidas Annansilmä-simbolon, mi ankoraŭ ĝojas kaj sentas fieron, rakontas Terho Ovaska.

– La simbolo povus estis videbla eĉ pli publike, ĉu ne?”

Ritva Sabelli

Pekka Kivioja, esperanton opettaja

Haastattelun Pekka Kiviojaa, ensimmäistä esperanto-opettajaani, joka aloitti kirjeensä näin:

Lienee viisasta seurata apostoli Paavalin esimerkkiä ja aina kirjeen alussa esitellä itsensä. Olen Kalajoella 1931 syntynyt, Kokkolassa oppikoulun käynyt, sitten armeija ja maanmittaus-insinööriopinnot Teknillisessä korkeakoulussa. Nykyisin asun Riihimäellä.

Haastattelija: Miten itse löysit esperanton ja miten opit sitä?

PK: Alkuinnostuksen esperantoon sain v. 1970 sisareni 40-vuotispäivillä Kuopiossa, jossa isäni piti sisarelleni onnittelupuheen. Puhe käsitti Zamenhofin henkilöhistoriaa. Innostuin tästä, ja kun oli syyskuu, niin palattuani Rovaniemelle menin välittömästi esperanton alkeiskurssille työväenopistoon. Siellä oli opettajana kansakoulunopettaja Toivo Pölönen. Hän oli siitä erikoinen, että jos joku oppilas jäi pois kurssilta, niin hän katsoi sen henkilökohtaiseksi arvosteluksi ja pahoitti mielensä. Seuraavana syksynä hän jäi itse pois eikä opettajaa ollut. Lopuksi rehtori pyysi minua ohjaamaan kurssia, enkä ymmärtänyt, mihin urakkaan olin alkamassa. Kohdalleni ei sen koommin sattunut tällaista ”teho-kurssia”, jossa viikko vierähti seuraavan tunnin valmistelemissä. Oli pakko oppia esperantoa!

H: Voitko kertoa lisää isästäsi ja kongresseista.

PK: Isäni Vilho Heikki Kivioja (VHK) vihittiin papiksi 1918. Hänen kertomansa mukaan johonkin lopputenttiin piti odottaa kolme kuukautta, ennen kuin tentti järjestettiin. Tällä odotusajalla hän opiskeli esperanton kielen. Periaate, että kaikki käytettävissä oleva aika piti käyttää hyödyksi, oli mukana kaikissa hänen toimissaan läpi elämän. VHK oli pappina Kalajoella 1923-1968. Vasta eläkkeelle päästyään hän palasi esperantoharrastuksiin. Maailman-kongresseihin hän osallistui v. 1970 (Wien),

1971 (Lontoo), 1972 (Portland, USA), 1973 (Belgrad, Jugoslavia), 1974 (Hampuri), 1975 (Kööpenhamina). Itse olin mukana hänen adjutanttinaan Kööpenhaminassa ja Hampurissa.

H: Onko suvussa muita esperantisteja?

PK: Muita esperanton harrastajia ei suvussamme ole.


H: Missä olet opettanut esperantoa?

PK: Rovaniemellä, kuten jo sanoinkin, ja Kokkolassa (jossa kurssi kuihtui lokakuussa) ja Reisjärvellä 1989-1990. Opetus on riippunut kulloisestakin asuinpaikasta.

H: Niin, muistan tuon Reisjärven kurssin. Oppikirjamme oli Jen Nia Mondo ja pääsimme sen 2. osaan. Sinä toit meille kurssilaisille aina jotakin välipalaa, josta saimme lisäpuhtia. Kursssi oli Kansalaisopiston kurssi, opettajaa ei ollut löytyä mistään. Sinulla oli noin 100 kilometrin työmatka. Outoa oli se, että ihminen, joka kurssia oli pyytännyt, ei sinne ollenkaan ilmestynyt.

Nyt takaisin haastatteluun. Mitä hyvää olet esperanton taidostasi tai esperantomatkoistasi ja -vierailtasi saanut?

PK: Läpiajomatalla Espanjaan oli Ranskassa hämmästyttävää todeta, että hotelleissa tuli ymmärretyksi esperantolla. Vieraistani kertoisin, että kerran meille tuli japanilaissyntyinen rouva, joka oli naimisissa norjalaisen kanssa, ja mukana olivat myös rouvan vanhemmat Japanista. Naisten kimonopuvut herättivät huomiota kaupungilla kävellessämme. Kerran sitten vanha rouva pyysi päästä kampaamoon, ja se hän järjestyi. Tytär kertoi minulle esperantoksi, mitä äiti haluaa, ja minä suomeksi kampaajalle. Kun menimme hakemaan vanhaa rouvaa kampaajalta sovittuna aikana, niin siellä hän oli tyytyväisenä odottamassa.



H: *Onko esperantosta tai esperantisteista ollut harmia?*

PK: Ei vielä ainakaan.

H: *Mitä toivot Suomen Esperantoliitolta?*

PK: Voimallista E-mainontaa kaikkiin medioihin. (Heillä lienee aika ajoin pulaa aiheista?)

H: *Mikä mielestäsi on ”esperanton sisäinen idea”?*

PK: Yksi yhteinen kieli ja kullekin oma äidinkieli.

H: *Onko esperantolla osaa tulevaisuudessa?*

PK: Toivottavasti. (Valitettavasti ei vain ole keskustelukumppania nykyisellä paikkakunnallani.)

H: *Lopuksi haluan kiittää sinua, Pekka, siitä että pääsin alkuun esperanton opiskelussa. Olin ollut kiinnostunut siitä jo parikin vuotta, mutta oppikirjaa ei aluksi löytynyt eikä silloisen asuinpaikkani kirjastossa Savossa tiedetty mitään esperantosta. Silloin ei vielä internet aukonut teitä tuntemattomaan. Simulta sain harrastuksen, joka antaa minulle jatkuvasti iloa ja päänvaivaa.*

PK: Niinpä niin.

Haastatteli R. Pyhälä

La 18-a lingva Esperanto-festivalo “Aroma Jalto”

Ukrajnaj esperantistoj invitas vin viziti la plej prestiĝan kuraclokon de Ukrainio, krimean urbon – Jalton. Tie okazos la tradicia lingva E-festivalo “Aroma Jalto-2006”. Belega ekzotika naturo, altaj montoj, senlima Nigra maro, florantaj kreskaĵoj, historiaj kaj naturaj vidindaĵoj inspiras Vian animon kaj iĝos neforgesebla evento de la jaro. Krimeo ĉiam allogis multajn homojn, kiuj strebas alten. Famaj verkistoj, poetoj, pentristoj vizitis tiun ĉarman bordon de la duoninsulo por krei siajn ĉefverkojn. Venu kaj komprenu, kial Krimeo estas nepre vizitenda almenaŭ unufoje en la vivo, des pli en la gastama kaj amika Esperanto-etoso.

Tempo: 29.04-09.05.2006

Loko: Krimeo, fama kuracloko Jalto

Programo: Seminarioj por Esperanto-instruantoj; lingvaj diversgradaj kursoj; Universitato; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; KGS; ludoj...

Loĝado: en 2-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 7 EUR; en 3-litaj ĉambroj kun luksaĵoj, kontraŭ 6 EUR; en 4-litaj ĉambroj kun lavabo kaj necesejo, kontraŭ 5 EUR; en 5-litaj ĉambroj sen luksaĵoj, kontraŭ 3 EUR. Loĝado ne estas ebla sen nutrado.

Manĝado en la bazejo estas 3-foja, kontraŭ 5 EUR.

Lingva ordo. Tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado ĉiu partoprenanto memstare plenigas la aliĝilon kaj respondas simplajn demandojn.

Aliĝkotizo por A-landoj ĝis unua de marto 20 eŭroj, surloke 30 eŭroj.

Kontribuantoj al la programo havos rabaton laŭ interkonsento.

Ĉeforganizanto Volodimir Hordijenko

UA-01133, Kijiv-133, p.k.35; tel/fakso (044) 285 17 01. Rete: volodimir_h@yahoo.com; www.aromajalta.by.ru

Esperanton maailmanliiton jäsenmaksut

On jälleen tullut aika maksaa UEA:n jäsenmaksu ja uudistaa lehtitilaukset. Vuodelle 2006 jäsenmaksut ovat seuraavat:

MG-jäsen	9 euroa	saa opaskirjan
MJ(-T)-jäsen	22 euroa	saa vuosikirjan
MA(-T)-jäsen	56 euroa	saa vuosikirjan ja Esperanto-lehden
DM(-T)-jäsen	1400 euroa	ainaisjäsen luokassa MA
DMJ(-T)-jäsen	550 euroa	ainaisjäsen luokassa MJ

TEJO-jäsenyyt

Jäsenmaksut ovat samat myös nuorille jäsenille (1.1.1976 jälkeen syntyneet, syntymäaika ilmoitettava maksettaessa). Nuorten jäsenmaksut (-T) sisältävät TEJO:n jäsenyyden ja Kontakto-lehden ja TEJO tutmondin tilauksen.

Tukijäsenkategoriat

Maailmanliiton toimintaa voi tukea maksamalla varsinaisen jäsenyyden lisäksi

- ♦ 112 euroa: Societo Zamenhof -jäsenmaksu
- ♦ 66 euroa: TEJO:n tukijäsen Patrono de TEJO (sis. Kontakto ja TEJO tutmonde)

Lehtiä ja julkaisuja

UEA:n julkaisujen hinnat tilattuna ilman jäsenyyttä ovat seuraavat:

Esperanto	36 euroa
Kontakto	22 euroa
TEJO tutmonde	11 euroa
Esperanto-Dokumentoj	28 euroa, 10 numeroa; englanniksi, ranskaksi tai esperantoksi

KONTAKTO

Suomen Esperantoliitto välittää myös muita lehtiä luettavaksesi. Hintaesimerkkeinä tässä:

Monato (maailman tapahtumista Esperantoksi, 11 nroa), hinta 46 euroa (lentopostilisämaksu 5 euroa), verkkolehti 27,60 euroa, lisäksi La Jaro (almanakka v. 2006), hinta 5 euroa

La Ondo de Esperanto (11 numeroa + kirjallisuusliite), hinta 27 euroa (lentopostilisämaksu 5 euroa)

Kysy myös muita lehtiä! Voit myös tilata kirjoja ja siirtää rahaa UEA-tilillesi kauttamme.

Kongressimaksut

Vuoden 2006 esperanton maailmankongressi on jo 91. ja tapahtuu 29.7.-5.8. Firenzessä, Italiassa. Ensimmäinen ilmoittautumiskausi on menossa ja päättyy vuoden lopussa, jolloin maksut nousevat. Jollet ole saanut ilmoittautumislomaketta, kysy toimistosta (yhteystiedot yllä). Myös UEA:n verkkosivuilla <http://www.uea.org> on kätevää ilmoittautua.

Suomen Esperantoliitossa kuulemme mielellämme toivomuksianne, vastaamme kysymyksiinne ja olemme käytettävissänne Esperantoa koskevissa asioissa.

Kiitos vielä Heta Kesälälle monivuotisesta työstä Esperanton hyväksi UEA:n pääedustajana Suomessa.

Hyvän yhteistyön toivotta Suomen Esperantoliiton puolesta: **Päivi Saarinen**, välitystoiminnan vastuhenkilö, eafoficejo@esperanto.fi, kotipuh. 09-8133217.

Välitystili: Sampo 800020-5995369 (ei sama kuin EAF:n yleinen tili)



Membrokotizoj de UEA

Estas denove tempo rekotizi por UEA.

La membrokotizoj estas:

MG-membro	9 eŭroj	membro kun gvidlibro
MJ-membro	22 eŭroj	membro kun jarlibro
MA-membro	56 eŭroj	membro kun jarlibro kaj abono de Esperanto
DM-membro	1400 eŭroj	dumviva membro kun abono de Esperanto (25 x MA)
DMJ-membro	550 eŭroj	dumviva membro kun jarlibro (25 x MJ)

TEJO-membreco

La kotizoj estas la samaj ankaŭ por junaj membroj (naskiĝintaj post 1.1.1976, memoru informi naskiĝdaton). La kotizoj por junaj membroj (-T) inkluzivas membrecon en TEJO kaj abonon de Kontakto kaj TEJO tutmonde.

Subtenaj kategorioj

La agadon de UEA eblas subteni per

- ♦ 112 eŭroj: Societo Zamenhof -membro
- ♦ 66 eŭroj: Patrono de TEJO (kun Kontakto kaj TEJO tutmonde)

Abonoj

La abonoj de la periodaĵoj de UEA:n sen membreco estas:

Esperanto	36 eŭroj
Kontakto	22 eŭroj
TEJO tutmonde	11 eŭroj
Esperanto-Dokumentoj	28 eŭroj, 10 numeroj; en la angla, franca aŭ Esperanto

EAF peras aliajn gazetojn, ekzemple:

Monato (11 numeroj), prezo 46 eŭroj (aerposta aldono 5 eŭroj), reta gazeto 27,60 eŭroj
 La Jaro (kalendaro por 2006), prezo 5 eŭroj
 La Ondo de Esperanto (11 numeroj + literatura suplemento), prezo 27 eŭroj (aerpoŝta aldono 5 eŭroj)



Ni peras ankaŭ viajn libromendojn kaj ĝirojn al viaj UEA-kontoj.

Kongreskotizoj

La 91-a Universala Kongreso okazos 29.7.-5.8.2006 en Florenco, Italio. La unua aliĝperiodo estas ĝis la jarŝanĝo, kiam la kotizoj altiĝos. Se vi ne havas aliĝilon, bv. peti de la oficejo. Eblas aliĝi ankaŭ per retpaĝoj de UEA en adreso <http://www.uea.org>.

Ni en Esperanto-Asocio de Finnlando volonte aŭdos viajn dezirojn, respondos viajn demandojn kaj disponeblas pri Esperanto-aferoj.

Ankoraŭfoje dankon al Heta Kesälä pro multjara laboro por Esperanto kiel ĉefdelegito en Finnlando.

Kun bondeziroj, por Esperanto-Asocio en Finnlando: **Päivi Saarinen**, peranto-respondeculo, eafoficejo@esperanto.fi, hejma tel. 09-8133217

Perantokonto: Sampo 800020-5995369 (ne sama kiel la ĝenerala konto de EAF).

Nova sekretario por la Centra Oficejo

La posteno de oficeja sekretario en la Centra Oficejo de UEA restis vaka post la emeritiĝo de s-ino Atie van Zeist en majo ĉi-jare. Intertempe la ĝenerala Direktoro de UEA dungis por tiu posteno s-ron Ralph Schmeits, kiu eklaboros la 1-an de novembro. S-ro Schmeits estas 26-jara aktivulo de Nederlanda Esperanto-Junularo. Kun unujara kontrakto li deĵoros kvar tagojn semajne. S-ino van Zeist plu helpas pri sekretariaj taskoj kiel volontulo unu tagon semajne.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Kirja Euroopan kielipolitiikasta

*Marjut Johansson ja Riitta Pyykkö (toim.):
Monikielinen Eurooppa – kielipolitiikkaa ja
käytäntöä. 374 sivua.*

Äskettäin ilmestynyt kirja käsittelee monikielisyyttä Euroopassa. Yhtenä kirjan 19 artikkelista on esperantistina tunnetun Jouko Lindstedtin kirjoitus itäisestä Keski-Euroopasta. Esperanto mainitaan Lindstedtin artikkelin lisäksi kahdessa muussa. Gaudeamus Kirjan nettisivujen mukaan kirja on tarkoitettu opiskelijoille, tutkijoille, kieltenopetuksen suunnittelijoille, kielipoliittisten päätösten valmistelijoille ja tekijöille ja myös kaikille kielistä kiinnostuneille.

(mm)



UEA kaj ILEI reprezentiĝis en Unesko

La akcepto de tri gravaj norm-donaj dokumentoj kaj la reelekto de Koichiro Matsuura kiel ĝenerala direktoro markis la 33-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko, kiu kunvenis en Parizo de la 3-a ĝis la 21-a de oktobro. Por la Esperantomovado la plej interesa el la akceptitaj dokumentoj estas la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de Kulturaj Espriroj, en kiu Unesko denove rememorigas pri la lingva diverseco kiel fundamenta elemento de kultura diverseco. La du aliaj novaj dokumentoj estas la Internacia Konvencio kontraŭ Drogoj en Sporto, kaj la Universala Deklaro pri Bioetiko kaj Homaj Rajtoj. En la programo de la Konferenco estis ankaŭ festo por omaĝi la 60-jariĝon de Unesko.

UEA kaj ILEI, kiuj estas en operaciaj rilatoj kun Unesko, estis invititaj al la Konferenco kiel observantoj. Reprezentiĝis entute 57 el ĉ. 350 neregistaraj organizaĵoj kun operacia statuso ĉe Unesko. Kiel delegitoj de UEA ĉeestis Renee Triolle kaj Barbara Despiney, dum Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj Francois Lo Jacomo reprezentis ILEI.

La Konferenco elektis duonon de la 58-membra Plenumkomitato de Unesko por kvarjara mandato. Alia duono konsistas el 29 membroj elektitaj en la 32-a konferenco en 2003. La Plenumkomitato kunsidas dufoje jare por kontroli la plenumon de la agadprogramoj akceptitaj de la Ĝenerala Konferenco. Prezidanto de la Plenumkomitato estos la ĉina vicministro pri edukado, s-ro Zhang Xinseng, ĝis la 34-a Ĝenerala Konferenco en 2007.

*(el komuniko de UEA
koncizigis mm)*



Esperantohistorio en la plej malnova urbo de Finnlando

Vintraj Tagoj en Turku 25.-26.3.2006

Vintraj Tagoj 2006 okazos en Turku, en Aurala-instituto, la multjara kunlaboranto de la loka asocio.

La malfermo okazos sabate posttagmeze je la 14a horo. La lunĉo ĉi-foje ne estas inkluzivita en la paketo, sed eblos kune manĝi antaŭ la komenciĝo de la oficiala programo. Por fruaj alvenantoj la organizantoj pretas oferti gvidadon en la urbo, ekz. konatiĝon kun muzeo aŭ la katedralo. Vi povas jam nun indiki viajn preferojn al la lokaj organizantoj.

En la vestiblo de Aurala estos Esperantoekspozicio honore al la historio de la internacia lingvo en Turku. Antaŭ 100 jaroj multo estis alia. Interalie la unuaj kursanoj en la urbo uzis la germanlingvan lernolibron *Vollständiges Lehrbuch der Esperanto Sprache*. La nuna societo fondiĝis en 1961. Ĝis Vintraj Tagoj aperos ĝisdatigo al la jam ekzistantaj historiaj priskriboj pri la loka agado verkitaj de Niilo Kavenius (la periodo 1906-1981) kaj Mikkola-Taranto-Tikkanen (1982-1991).

La oficiala programo enhavos konatiĝon kun Esperantopoŝtmarkoj kaj aliaj kolektindaĵoj kun Martti Vihanto (finnlingve, laŭbezona interpretado). Carola Antskog kaj aliaj kunlaborantoj pri la historia verko pri la landa movado prezentos sian laboron. Ni konatiĝos kun la preparoj por la jubileo de EAF en 2007. Prelegos ankaŭ Väinö Havu, emerita haŭtkuracisto, kiu estas aktiva en la loka Esperanto-societo.

Inter la prelegoj kaj la vespermanĝo okazos membroasociaj kunvenoj, ekz. de ELFI (instruistoj). La anoj de Societo Nino Runeberg estas invititaj al akcepto. (Pagante la SNR-kotizon 36 eŭroj al EAF oni subtenas la agadon de EAF.)

Aliĝilo

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 25.-26.3.2006 en Turku.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

14 e ĝis 15.1.2006 _____

18 e ĝis 28.2.2006 _____

21 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.

Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-paketo 25.-26.3. kun manĝoj (vespermanĝo sabate, tagmanĝo dimanĉe kaj kafoj) kaj rondveturo dimanĉe: **30 e** _____

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Bonvenon!

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Talvipäiville Turkuun 25.-26.3.2006.

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

14 e 15.1.2006 saakka _____

18 e 28.2.2006 saakka _____

21 e 28.2.2006 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Alle 15-vuotiaat lapset ilman maksua.

Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäiväpaketti sisältää ruoat (iltaruoka lauant., lounas sunnunt., kahvit) ja kiertoajelun sunnuntaina: **30 e** _____

Yhteensä maksettava EAF:n tilille _____

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825. Käytä talvipäivien viitenumeroa 4640.

Lisätietoja tai toivomuksia:

Lähetä ilmoittautumislomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki

Tervetuloa!

Vespera kunestado enhavos festetan programon. Kontribuoj estas bonvenaj. Noktemuloj povos poste viziti observatorion por vidi la stelojn kune kun Mikko Mäkitalo.

Dimanĉe post la jarkunveno ni sub gvido de Jorma Ahomäki faros rondveturon laŭ la ŝpuroj de niaj pioniroj. En Turku troviĝas multaj lokoj, kie agis gravaj Esperantoagantoj. Interalie G.J. Ramstedt lernis kaj instruis en la urbo.

La tagojn fermos komuna lunĉo en belega malnova konstruaĵo: Verkahovi, antaŭa ŝtofa fabriko.

Konsiloj pri tranoktejoj

Bonvolu noti, ke ĉiĉoj memstare aranĝos la tranoktadon. La multaj hoteloj kaj gastejoj de la urbo estas je via dispono. Proksime de Aurala-instituto situas du interesaj kaj favorprezaj tranoktejoj: Gastejo Majatalo Metso en urboparto Raunistula kaj Hesehotelli apud la aŭtobusa stacidomo. La adresojn kaj telefonnumerojn vi trovos en la finnlingva parto. Turku-anoj helpos vin laŭbezone, vidu kontaktinformojn.

Kontaktpersonoj

Aranĝoj surloke (manĝoj, helpo kun tranoktaj aranĝoj ks.): EAF-sekretario kaj EST-prezidanto Tiina Oittinen kaj EST-sekretario Leena Tiusanen, tel. 02-2320542 aŭ EST-estrarano Anja Launiainen, anja.launiainen@turuntori.com

Programo: EAF-sekretario Tiina Oittinen kaj lokaj kunlaborantoj.

Aliĝiloj: EAF-vicprezidanto Päivi Saarinen kunlabore kun la EAF-kasisto.

Esperantohistoria i Finlands äldsta stad

Vinterdagar i Åbo 25-26.3.2006

Vill du veta mer om Finlands Esperantoförbunds vinterdagar i Åbo på svenska kan du kontakta förbundets ordförande Anna Ritamäki (kontaktuppgifter s. 2).

Esperantohistoriaa Suomen vanhimmassa kaupungissa

Talvipäivät Turussa 25.-26.3.2006

Talvipäivät pidetään Turussa, Auralan kansanopistossa, joka on paikallisyhdistyksen monivuotinen yhteistyökumppani.

Talvipäivät avataan lauantaina iltapäivällä kello 14. Lounas ei tällä kertaa sisälly pakettiin, mutta yhteinen ruokailu on mahdollista ennen virallisen ohjelman alkua. Aikaisin tuleville järjestäjät tarjoavat opastusta kaupungilla, esimerkiksi tutustumisen museoon tai tuomiokirkkoon. Voit jo nyt ilmaista toivomuksesi paikallisille järjestäjille.

Auralan aulassa on esperantonäyttely kansainvälisen kielen turkulaishistorian kunniaksi. Sata vuotta sitten moni asia oli toisin. Ensimmäiset kurssilaiset muun muassa käyttivät saksankielistä oppikirjaa *Vollständiges Lehrbuch der Esperanto Sprache*. Nykyinen yhdistys perustettiin vuonna 1961. Talvipäiviin mennessä ilmestyy täydennys entisiin paikallisen toiminnan historiankuvauksiin, jotka ovat kirjoittaneet Niilo Kavenius (ajanjakso 1906–1981) ja Mikola-Taranto-Tikkanen (1982–1991).

Viralliseen ohjelmaan kuuluu tutustuminen esperantopostimerkkeihin ja muihin keräilytavaroihin Martti Vihannon kanssa. Carola Antskog ja muut Suomen esperantoliikkeen historiateosta kirjoittavat esittelevät työtään. Tutustumme Suomen Esperantoliiton juhluvuoden 2007 valmisteluihin. Lisäksi luennoi Väinö Havu, eläkkeelle siirtynyt ihotautilääkäri, joka on paikallisen esperantoyhdistyksen aktiivi.

Luentojen ja iltaruokailun välissä pidetään jäsenyhdistysten kokouksia, mm. ELFIn (opettajien yhdistys). Nino Runeberg -seuran jäsenet ovat kutsuttuja vastaanotolle. (Maksamalla Nino Runeberg -seuran jäsenmaksun 36 euroa Espe-

rantoliitolle voi tukea liiton toimintaa.)

Illanvieton ohjelmaan ovat tervetulleita osallistujien omatkin ohjelmanumerot. Pirteille illanviettäjille on mahdollisuus lähteä vielä tähtitorniin katsomaan tähtitaivaan kohteita Mikko Mäkitalon kanssa.

Sunnuntaina vuosikokouksen jälkeen tehdään Jorma Ahomäen opastuksella kiertoajelu merkikhenkilöitten jäljillä. Turussa on monia paikkoja, joissa merkittävät esperantonharrastajat ovat vaikuttaneet. Muunmuassa G.J. Ramstedt opiskeli ja opetti kaupungissa.

Päivät päättyvät yhteiseen lounaaseen kauniissa entisessä verkatehtaassa, Verkahovissa.

Ohjeita yöpymispaikoista

Huomaa, että jokainen järjestää tällä kertaa itse yöpymisensä. Kaupungin monet hotellit ja majatalot ovat käytettävissä. Auralan opiston lähellä on kaksi hyvää edullista paikkaa: Majatalo Metso Raunistulan kaupunginosassa ja Hesehotelli linja-autoaseman vieressä. Kysele tarpeen mukaan apua myös turkulaisilta yhteyshenkilöiltä.

Majatalo Metso: Virusmäentie 2-4, puh: 02-2345222, www.majatalometso.fi

Hesehotelli: Läntinen Pitkätie 1 (linja-autoaseman vieressä), puh: 045-6343443, www.hesburger.fi/hesehotelli
hesehotelli@hesburger.fi

Yhteyshenkilöt

Järjestelyt paikalla (ruokailut, apu yöpymisten järjestämiseen yms.): EAF:n sihteeri ja EST:n puheenjohtaja Tiina Oittinen ja EST:n sihteeri Leena Tiusanen, puh. 02-2320542 ja EST:n hallituksen jäsen Anja Launiainen puh. 040-827 7324, anja.launiainen@turuntori.com

Ohjelma: EAF:n sihteeri Tiina Oittinen ja paikallinen ryhmä.

Ilmoittautumiset: EAF:n varapuheenjohtaja Päivi Saarinen yhteistyössä EAF:n taloudenhoitajan kanssa.

Estraro kunvenis

La estraro kunvenis en la oficejo la 28-an de oktobro (kunveno 8/2005) je 11.15 ĝis 16.10 ĉefe por pritrakti aferojn de la projekto Al kvalita komunikado. Ĉeestis Ritamäki, Oittinen, Huuskonen, Saarinen, Saastamoinen, Vihermä, Pirinen, Rinta-Karjanmaa.

La estraro notis donacojn lige al AT en Lesjöfors, i.a. Kalevala-libro lotume gajnita de Raimo Tuisku en literatura kvizo, jubilea broĉo donacita al Lennart Svensson de Esperantodomo, T-ĉemizo kaj Esperantotulipoj al la svedaj organizantoj. EAF ricevis donace KD:n “Svedaj kantoj 2003”. EAF donaciis gravuritan jubilean broĉon al Tiina Oittinen en ŝia 50-jara festo.

Fondumo Esperanto (FES) festis sian 50-jaran jubileon 24.10.2005 en Helsinko. Krom la prezidanto Anna Ritamäki, kiu salutis la kunvenon nome de EAF, en la festo ĉeestis ankaŭ kvin aliaj de la estraro. Entute estis ĉirkaŭ 30 partoprenantoj. EAF donacis Setälä-medalojn al la festpreleganto Probal Daşgupta kaj al kanteludisto Timo Väänänen.

La kunsido akceptis la subvencipeton de 1014 eŭroj por Kultura Esperanto-Festivalo 2005. La sumo egalas al parto de la kostoj por informado kaj la proksimuma antaŭvidita malgajno de KEF post la kontribuoj de FEJO kaj EKH (po 2000 eŭroj). La ligo al la AKK-celoj estas klare motivigita per informoj pri la realigo de la informado pri KEF kaj la granda informa efiko de la evento dum kaj post la evento. La KEF-organizantoj Riitta Hämäläinen, kiu laboras kiel informisto, kaj Katja Lampinen, kiu laboras ĉe radio, pretas prezenti al EAF kiel realigi aleksteran informadon en konkretaj situacioj. [Ili akceptis la inviton veni al la sekva estrarkunsido kaj komenciĝis preparado por finnlingva kurso pri informado.]

La estraro fiksas la kotizojn por Vintraj Tagoj en Turku 25.-26.3.2006 kaj akceptis la proponon de la Esperantosocieto de Oulu (ESO) pri okazigo de Aŭtunaj Tagoj 16.-17.9.2006 en

